

& La mulo kaj la di-statuo:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 217 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

(#Melodio:

<:31> (/mi mi dolre mi mi mido re fa; mimimi mimi mido re fa;

(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 La /mulo2 portis di-statuon, ; kaj multaj fleksis la genuon.

(×:; **En la ĉen' ; dancu nun trankvile ; ĉiuj ni trankvilas ; jen en amika ĉen' ; dancu nun trankvile.**)

'2 La best' imagis, ke l'honoro ; koncernas ĝin, kaj pro ĉi gloro

'3 tia orgojlo ĝin infektis, ; ke dance, prance ĝi afektis,

'4 kaj sin skuadis, kapriolis, ; la ŝarĝon de si ĵeti volis.

'5 Bastonon prenis nun la mastro, ; tradraŝis ĝin kun kruda drasto,

'6 kaj kriis al ĝi por admono: ; "Vi estas, lernu per bastono,

'7 ne dio kaj nemortemulo, ; sed di-statuoporta mulo!"